# BOLETIN

## DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

AÑO XVI Nº 228-229 JULIO-OCTUBRE 1978

# 63-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (Varna)



Reprezentantoj de Landaj Asocioj atendas la momenton por saluti...

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

DIRECTORA:
Dª Mª Aurora Viloria Nieto

DIRECCION Y ADMINISTRACION:
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

REDACTOR JEFE:
D. Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40 - Telf. (93) 2401428
BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION:
D. Llibert Puig
D. Giordano Moyá
D. V. Hernández Llusera
D. Gabriel Mora y Arana
D. Pedro Nuez

*La enhavo de la artikoloj ci tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; gi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la autoroj mem.*

Depósito Legal: VA. 616.—1978
Gral. Andrés Martin, S. A. - Juan Mambrilla, 9 - Valladolid

# UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

**Prezidantino**

Mª Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12-2º-C
Télf. (983) 260086
VALLADOLID

**Sekretario**

Luis Hernández García
adreso kiel supre

**Kasistino**

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde 8-8º-A
VALLADOLID

Pagoj sendu al nia Konto
Nº 001.664-0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana E.
A. Lorenzo Hurtado, 1
VALLADOLID

LIBRO-SERVO DE H.E.F.

Jacinto Urueña Antón
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

Pagoj por Libro-servo, sendu al
Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cuenta Nº 042.268-4 a nombre de
LIBRO-SERVO DE H.E.F.
VALLADOLID

ELDONA FAKO

Inés Gastón
Pº Marina Moreno, 35-4º
ZARAGOZA-1

INFORMA FAKO

Ramón Molera
Sta. Joaquina, 13
MOYA (Barcelona)

# «PLI-PLI»

Pli rapide, pli rapide; kaj pli pli ankoraŭ! Jen la slogano de la nuntempa moderna epoko kaj verŝajne ankaŭ la ĉefa celo de la nuntempa moderna gejunularo. Dume la eterna marŝado de la tempo, la centra forto de la vivo, la kerno de la universaj naturaj leĝoj, kiuj regas la tuton vivantan en kaj sur la tero, daŭre sekvas sian normalan alternativan ritmon nek pli nek malpli rapide; ĉiam egalpase; eternaj samaj ŝanĝoj: Printempo, Somero, Autuno, Vintro kaj tiel ĉiam. Sen komenco kaj sen fino. Saman vivoritmon oni povas observi kie ajn ĉe kiu ajn vivoformo sur la tero krom tiu de la homo.

Jes, verŝajne la homestaĵo estas la unika, kiu ne konformiĝas al la normala evolua ritmo, kiun la Kreinto destinis al siaj kreitaĵoj. Sed, kien iras la homaro per tiu ekstrema akcelado ĉiuflanke de sia ĉiutaga vivo, kiu ne lasas lin ripozi eĉ unu trankvilan minuton? Ĉu ne pli saĝe atente kaj detale antaustudi la nunajn ĝeneralajn cirkonstancojn kaj ekplugi glatan kaj larĝan vojon al mondpaca efektivigo? Ĉu ĝi kuras laŭrekte al la realigo de tiu celo?

Supozante, ke ĝenerala celo estas estigi fratan kaj pacan kunvivadon inter la homoj de la tuta mondo, ĉu la nuntempa moderna agmaniero havas sancon atingi ĝin? Ĉu eblas paca interkonsento sen komuna lingvo interkomunika?

Jen demandoj, kies celtrafaj respondoj absolute malpermesas rapidecon. Sed male ili postulas atentan kaj seriozan pripensadon kaj fundan studon, el kio oni eltiros krom viglan torĉon lumiganta sekuran vojon ankaŭ konkretajn pruvojn evidentantaj la falsecon de la slogano supre menciita.

Estas jam tempo, ke la tutmonda gejunularo kunagante ekprenu la gvidan torĉon lumiganta la bonan vojon al realigo de paradiza homa kunvivado sur la terŝelo. En ĝiaj manoj estas la necesaj rimedoj por la efektivigo de tiu grandioza celo. Nur ĝi posedas sufiĉan inteligentecon kaj komprenon por la finsolvo de tiu grava problemo. La loborilaro estas preta. Jen ĝi:

La lumiga torĉo, nomiĝas D-ro L.L. Zamenhof; la plej glata vojo, Tutmonda Esperanta Movado; la ĉefa rimedo, Internacia Lingvo Esperanto; batalkampo, La tuta mondo; Konsistigo de batalfortoj, ĉiu vera pacamanto!

**A. C.**

# LA URBETO KIE OKAZIS LA 20-A KATALUNA E-RENKONTIĜO

**TORTOSA**

La unuaj enloĝantoj de Tortosa estis la ilergavonoj, parenca popolo al la ilergetoj kaj ambaŭ el iberia raso. Laŭŝajne la kartaganoj fondis, ĉe la dekstra margeno de rivero Ebro kolonion, kiun oni nomis Ibera aŭ Hibera kaj kiun aliaj historiistoj supozas fondita pli sude kiel ebla origino de la urbo Amposta Ĉu temis pri Ibera aŭ alia kartagana kolonio, same la romanoj decidis ĝin konkeri kaj tiucele ili fortikiĝis sur la montopinto, kie hodiaŭ troviĝas la kastelo de Sankta Johano. Pli poste en la sama loko oni konstruis la romanan urbon Julio Cesar titolis gin municipo kaj Aŭgusto, kiel kolonion Julia Augusta Tortosa La lasta el kvar nomoj, kiu originigis la aktualan, signifas lau la historiistoj «ŝtona urbo» dum aliaj opinias ke ĝi povus esti degenero de 'ortuosa kiun nomon eble havis la urbo, ĉar ĝi troviĝis kvazaŭ digo ĉe la margenoj de rivero Ebro.

Dum la komenca tempo sub la romana regado, Tortosa fariĝis urbo sufiĉe grava eĉ ĝi eldonis propran moneron kun barko kiel insigno.


Post mallonga visigota periodo, Tortosa eniris en sian plej bazan kaj gravan epokon la saracenan regadon. Ĉi-tiu periodo estis tiel longa kaj esenca por Tortosa kaj ĝia teritorio, ke se Tarragona estos antaŭ ĉio romana urbo, kiel oni ĝenerale diras, Tortosa, malgrau la malmutaj restaĵoj arabaj, estas antaŭ ĉio urbo kaj teritorio arabecaj, ĉar estis la araboj kiuj faris ĝin grava kaj granda kaj donis al ĝi karakteron.

La Suda, poste alnomita Sankta Johano-kastelo, kiu de supre rigardas la arabecan urbon, estas la sola grava restaĵo de tiu epoko Tamen, la intensa vivo de la araboj en la teritorio postlasis en ĝi plurajn nomojn. Tiel, tre ofte ni trovas tiujn, kiuj komenciĝas per Beni, kiel Benissanet, Benífallet ktp. La araboj estis fakte, kiuj valorigis kaj riciĝis tiun teritorion per siaj variaj akvumaj konstruaĵoj La tiamaj enloĝantoj estis spertaj pri ĉiuspeca manlaborajo kaj komerco kaj cetere Tortosa estis tre grava studocentro. La ĉefaj regantoj de la urbo valioj), post la malapero de la Kordoba kalifejo, tio estas, en la tempo de la Taifo-regnoj, estis Mochehid, Mokabil kiu ekregnis je la jaro 1.041; Yala je la jaro 1.053 kaj Nabil finigita sian regadon je la jaro 1.090.

Laŭŝajne la araba ŝtato de Tortosa estis konkerita je la jaro 1.100 de la araba reĝo el Zaragoza kaj pli poste de la almoravidoj, la lastaj muzulmanaj konkerantoj, kiuj je profito de la Kalifejo-rompo alvenis el norda Afriko.

Dume, la katalunaj grafoj multe progresis en sia rekonkerado. Je la jaro 1131 la 17-jara Ramon Berenguer IV, heredis la graflandon de Barcelono kaj decidis definitive rekonkeri la novan Katalunlandon, kion komencis liaj antaŭuloj. Je la jaro 1148, li konkeris Tortosa-n kun la helpo de la genovanoj, de la templanaj kavaliroj kaj de la nobelo Ramon de Montcada. Kun Ramon Berenguer IV finigis la araba vivo en Tortosa kaj komenciĝis la kristana.

Post la rekonkerado, la Suda nomiĝis kastelo de Sankta Johano kaj la katedralo anstataŭis la moskeon, kiun oni konstruis sur ties restaĵoj.



S-ro Petro Nuez, prezidanto de K.K.K. salutas la geesperantistoj

# 20-A KATALUNA ESPERANTISTA REKONTIĜO (Tortosa 30a Setembro 1-a Oktobro 1978)

La nunjara Kataluna Esperantista Rekontiĝo havis specialan karakteron, unue pro la fakto ke ĝi okazis en urbeto kiu situas malproksime de Barcelono kaj ĝia provinco, fokuso de la plej multnombra esperantistaro, kaj due, kaj tio estas ekde la kultura vidpunkto ege grava, la restarigo de la Internaciaj Floraj Ludoj kiu brile sukcesis.

Dum du tagoj katalunaj gesamideanoj kunvenis en urbeto Tortosa kaj tien ili povis ĉeesti la diversajn erojn, kiuj laŭ la programo ricevita estis:

**30-an Setembro**

Je la 17 horo: S-ro Petro Nuez, Prezidanto de Kataluna Esperanto Kunordiga Komitato de la Hispana Esperanto Federacio (H.E.F.) gvidos publikan Esperanto-lecionon.

Je la 19,30: En la Urba Kulturdomo oni inaŭguris tre interesan ekspozicion pri «La Monda Lingvo-Problemo».

Je la 20,00: En la sama loko S-ro Joan Moretó i Raventós prelegis en kataluna lingvo pri la temo «L'Esperanto avui: Vells i nous plantejaments».

Je la 22,30: Okazis en «Casal Tortosi» la ĉiam gaja kaj amika interkonatiga vespero, kiu estis akompanata por ĉiuj geamantoj de la modernaj ritmoj, de balo.

**1-an de Oktobro**

Je la 9,00 horo: S-ta Meso en Esperanto, diservis Pastro Manuel Casanoves C.M.F.

Je la 11,00 horo: ciuj gepartoprenantoj estis akceptataj en la Urbodomo de Tortosa.

Je la 12,00 horo: Oficiala inaŭguro de strato «Esperanto».

Je la 13,00 horo: En la aŭditorio de la Kulturdomo okazis la 18-aj Internaciaj Floraj Ludoj en Esperanto. Dum ĝia okazigo la Prezidanto de K.K.K. legis leteron sendita de la Prezidantino de H.E.F. kaj la juĝantaro premiis laŭ la veredikto kiu aperas aliloke en tiu-ĉi sama BOLETIN.

Je la 15,00 Horo: Bankedo, en la deserto oni disdonis la premion Klara Silbernik Ni kore gratulas S-inon Carme Canovas de Puig kiu meritplene atingis la premion.

Kiel kutime kaj tradicie laŭ longe de la jaroj, Centro de Esperanto Sabadell zorgis pri Libro-Servo kaj en ĉiu momento ili bonege servis la dezirojn kaj emojn de la gepartoprenantoj pri aĉetado de libroj.

Ni kore gratulas niajn katalunajn gesamideanojn pro sia efika kaj senlaca laboro favore al la disvastiĝo de la internacia lingvo ESPERANTO.



**Fidelaj ĉeestantoj de la K.E.R. en Tortoso**

# 18-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1978-a

## VERDIKTO

**NATURA FLORO:** «El taglibro por Kristina», de Kris LONG, el Britujo

1º Subpremio: «Tenera saŭdado», de Reto Rossetti, el Anglujo

2º Subpremio: «Marborde», de Zora HEIDE, el Danlando

**JASMENO:** «Stranga sonĝo», de Simeon M. SIMEONOV, el Bulgarujo

**VIOLO:** «Rita», de Lina GABRIELLI, el Italujo

1º Subpremio: «Ĉi nokte», de J. BALBIN, el Usono

ORIGINALA PROZO: «Memoraĵo el Pompejo», de Bernard GOLDEN, el Hungarujo

1º Subpremio: «Onia meditado», de Giordano MOYA, el Hispanujo

2º Subpremio: «Luna nokto», de Oldřich KNICHAL, el Ĉeĥoslovakujo




## INTERNACIA ASOCIO UZAS ESPERANTON

Internacia Asocio titolita «Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj» (I.K.E.L.) kiu bazas sian agadon sur la principo de suvereneco de ĉiu etno en la kadro de tuthomara solidareco havas kiel oficiala lingvo la internacia lingvo Esperanto.

Ĉiuj kiuj interesiĝas pri ĉi tiu temo, petu rekte informojn de la Sekretario de I.K.E.L.

S-ro Francesc Ibañez
Diputación 199
BARCELONA-11

# GRANDIOZA 63-a UNIVERSALA

De la 26-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto okazis en Varna (Bulgario) la 63-a Universala Kongreso de Esperanto, sub la alta patroneco de la Vicprezidanto de la Bulgara Respubliko, S-ro Petro Tanĉev. Al la Kongreso aliĝis pli ol 4.000 gekongresanoj el 51 landoj, inter kiuj pli ol 40 gesamideanoj el nia lando.

Ĉi tiu Kongreso estis la plej multnombre ĉeestata de ĉiuj U.K. ĝis nun okazintaj, se ni ne konsideras la 15-an Universala Kongreso okazinta en 1923.

Kiel kongresejo funkciis la impona kaj moderna konstruaĵo de la Sportpalaco kie okazis la plej gravaj eroj de la kongresprogramo.

Kun la granda halo plenplenega da gesamideanoj de la kvin kontinentoj okazis la solena inaŭguro. Ĉe la prezida tablo la Alta Protektanto S-ro Tanĉev, D-ro Tonkin, Prezidanto de U.E.A., S-ro Janev, Urbestro de Varna, S-ro Zahariev, reprezentanto de UNESKO, kaj estraranoj de U.E.A. kaj membroj de la Organiza Komitato. Post la belaj kantoj, bele kaj harmonie ludataj de la horalo el Tarĝoviste, salutis la Prezidanto de U.E.A. kiu prezentis al la ĉeestantaro la membrojn de la prezida tablo. Sekve, bulgare salutis la Alta Protektanto kaj sia parolado tradukis esperante la Prezidanto de L.K.K., kiu ankaŭ tradukis la bonvenigajn vortojn de la Urbestro de Varna. S-ro Zahariev legis en franca lingvo la mesaĝon de la Generala Direktoro de UNESKO, kies teksto ni aperigas en esperanta traduko en alia paĝo. Post la vortsalutoj de reprezentantoj de 12 landoj, la solena inaŭguro finiĝis per parolado de la Prezidanto de U.E.A. D-ro H. Tonkin.


Kun multaj esperantistoj ni ĉeestis la ekumenan Diservon okazinta en la Ortodoksa Katedralo el Varna, kie esperante kaj ekumene diservis Katolikajn, Protestantajn kaj Ortodoksajn Pastrojn.

En la granda halo de la kongresejo okazis la malfermo de la Kongreso. Post muzika enkonduko de blovorkestro, la Vicprezidanto de U.E.A. Prof. D-ro Stop-Bowitz bonvenigis la ĉeestantojn. Geinfanoj kiu partoprenis la Infanan Kongreseton kun verdaj flagetoj kaj muziko gaje salutis la Kongreson.

Poste, salutis la Kongreson en bulgara lingvo akademiano Kiril Bratanov reprezentado de la Monda Federacio de Sciencistoj kaj sekve D-ro Sadler invitis la reprezentantojn de Landaj Asocioj por saluti. Nome de Hispana Esperanto Federacio salutis la Prezidantino S-ino Urueña, per jenaj salutvortoj:

«Nome de H.E.F. mi salutas la prezidantaron kaj ĉiujn geparto-

# KONGRESO EN VARNA (BULGARIO)



prenantojn en ĉi tiu Universala Kongreso en Varna. Antaŭ jaroj mi konas pere de miaj bulgaraj gekorespondantoj, la afablecon kaj amikecon de la bulgara popolo.

Hispanio, kiu ĉiam donis al la mondo pruvojn de sia internacieco, hodiaŭ havas du gravajn novaĵojn por la esperantista movado: Unue, la eldonado en esperanta lingvo de la glora verko de la universala literaturo D. Quijote de Cervantes, bele presita kun gravuraĵoj de G. Doré. Due, ke post multaj jaroj denove reokazigos la 18-an Internaciajn Florajn Ludojn en Katalunio, organizitaj de la Kataluna Kunordiga Komitato de H.E.F.

Fine, mi deziras al ĉiuj sukcesan kaj fruktodonan kongreson».

Laŭlonge de la kongressemajno

okazis interesaj kaj allogaj programeroj, sed kompreneble pro manko da tempo oni devas elekti, laŭ viaj preferoj. Do, tiel mi faris kaj mi parolos pri ili.

Lunde, mi partoprenis la rondveturadon tra Varna. La programo estis interesa, sed reale ni vidis nenion, ĉar ĉiuj Muzeoj estis fermitaj tiu tago. Ĉu la Kongresa Komitato ne povis antaŭvidi tion? Krom tio, la oficiala gvidistino nur parolis bulgare kaj nur dank'al la ĝentila helpemo de bulgara samideano la afero solviĝis.

Marde, mi ĉeestis kunvenon de Monda Turismo, tre interesa kaj kie oni informis pri diversaj esperantistaj aranĝoj. P. m. ankaŭ okazis interesa kunveno pri «Varbado de Novaj esperantistoj», kie multaj el la gepartoprenantoj parolis pri siaj propraj spertoj.

Merkrede, okazis la tuttagaj ekskursoj, kaj mi partoprenis tiun al Nesebar, tre interesa, sed kun la sama problemo pri gvidanto de la rondveturado. Ĉi tie estis svisa samideano kiu tradukante la germanan klarigon de la bulgara gvidistino salvis nin.

Tre interesa prelego mi aŭskultis jaŭde, en la kadro de la Internacia Somera Universitato. D-ro Smet prelegis pri «La balenoj minacataj gigantoj de la Oceanoj». La tre interesa prelego estis akompanata de tre interesaj diapozitivoj kiu bone taŭgis por pli bone kompreni ĉi tiun temon.

La vendredo okazis la dua Ĝenerala Kunveno de U.E.A. kie sub prezido de S-ro Pettyn, oni traktis la kongrestemon «Internacia Lingvo, Internacia Edukado», tie informis la gvidantoj de la diversaj diskutgrupoj pri la proponoj faritaj de la ĉeestantoj. Fine D-ro Tonkin komentis la Rekomendon de UNESKO pri Edukado, dirante ke Esperanto ankaŭ celas la plenan disvolvon de la homo, kaj traktas pri ĉiuj aspektoj de lernado, ĉar la esperantistoj edukas sin pere de korespondado, lernado de Esperanto, partopreno en Kongresoj k.t.p. Pri la universala kompreno kaj respekto por ĉiuj popoloj, D-ro Tonkin enfazis ke esperantistoj komprenas pli bone ol aliaj la popolojn, ĉar ni rilatas kun aliaj ne per la uzataj kanaloj: radio, televido k.t.p. sed inter la homoj mem.

Kompreneble ankaŭ okazis distraj programeroj, inter ili mi mencias: interkona vespero, balo, bulgara vespero, distra fojro, internacia vespero k.t.p.

Se ĉio dirita estis interesa, laŭ mia opinio pli interesa estis la homaj kontaktoj kiuj oni povis fari dum la kongreso. Kia plezuro renkonti tiun korespondanton aŭ korespondantinon kun kiu ni interkorespondadis antaŭ pluraj jaroj! La koridoroj de la Kongresejo estis ĉiam plenplenaj kaj ĉiuj havis eblecon paroli kun gesamideanoj el la tuta mondo uzante la internacian lingvon.

Kiel ĉio en la vivo, ankaŭ venis la momento de la fermo, kaj ĝi okazis la 5-an de aŭgusto. La granda halo estis plena de gekongresanoj. D-ro Tonkin malfermis la kunvenon kaj la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. resumis la kon-

gresajn laborojn. Sekve S-ro Pettyn legis la kongresajn resoluciojn, kiuj estis unuanime akceptitaj. Sekve, oni legis la rezultojn de la Belartaj konkursoj, kaj fine Prezidanto Tonkin per trafa parolado, dankis ĉiujn kiuj faris ebla tiun imponan Kongreson. Kiel kutime la Prezidanto de L.K.K. transdonis la kongresflagon en la manojn de la Prezidanto de L.K.K. de la 64-a U.K. okazonta en Luzerno (Svislando). La gorĝoj de ĉiuj ĉeestantoj entuziasme kaj fervore kantis la Espero-n. La 63-a U.K. finiĝis.

Notinde estas ke la Ministerio pri Poŝto el Bulgario el donis poŝtmarkon je valoro 13 stotinkoj. Ĝi estas la 5-a bulgara poŝtmarko dediĉita al la internacia lingvo Esperanto.

KONGRESANO

---

# REZOLUCIO

## de la 63-a U.K. de Esperanto

La partoprenantoj de la 63-a UK de Esperanto, okazinta en Varno, Bulgario, de la 29 de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1978, diskutis pri la temo «Internacia lingvo—internacia edukado».

Ili konstatis, ke:

- la ĉiaspecaj rilatoj trans landaj, kulturaj kaj lingvaj limoj fariĝas pli kaj pli multnombraj kaj multflankaj, kaj ke same rapide kreskas la neceso pri sendiskriminacia kunlaborado trans tiuj limoj;
- edukado por internaciaj komprenigo, kunlaboro kaj paco estas nepra antaŭkondiĉo por atingi harmonian kaj justan disvolviĝon de tiuj rilatoj kaj de tiu kunlaborado;
- ekzistas ne preteratenteblaj aspektoj lingvaj de la edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaborado kaj paco.

Ili alvokas la internaciajn kaj landajn instituciojn kaj organizaĵojn:

- aparte memori la esencan gravecon de edukado al internacia komprenigo en spirito de egaleco kaj reciproka respekto, esprimitan ekzemple en la Rekomendo de UNESKO pri Edukado por Internaciaj Komprenigo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj;
- prikonsideri, ke tiu eduka procedo etendiĝas tra la tuta vivo kaj ne estas limigita nur al formala klerigo;
- atenti, ke internacia kompreniĝo antaŭsupozigas la necesajn rimedojn inkluzive de la lingvaj rimedoj;
- esplori la efikon al internacia kompreniĝo de la nuna lerneja kaj eksterlerneja edukado kaj pristudi alternativajn modelojn utiligante ankaŭ la eksperimentojn faritajn kaj faratajn en pluraj landoj, interalie sub aŭspicio de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI), pri la lerneja instruado de la Internacia Lingvo Esperanto;
- kaj esplori la spertojn akiritajn dum pli ol naŭdek jaroj per la lernado kaj uzado de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu, ebligante senperan ĉiudirektan aliron al aliaj kulturoj, edukas siajn uzantojn al plivastigo de la propra alrigardo al la mondo kaj al respekto de kultura diverseco.

# NOTAS DE INTERES PARA TODOS LOS FEDERADOS

**ENCUESTA DIRIGIDA A LOS GRUPOS ADHERIDOS A H.E.F.**—Con el fin de conocer el estado actual y las actividades desarrolladas por cada Grupo o Sección adherido a la Federación, se envió una encuesta a la que han respondido bastantes Grupos. Rogamos a los que aún no lo han envíado, lo hagan a la mayor brevedad, ya que estos datos nos servirán para conocer el desarrollo del movimiento esperantista en España.

**VOCALIAS DE LA FEDERACION.**—De conformidad con la nota aparecida en la hoja 2º de la Circular Nº 1 y que en su día fue envíada a todos los socios, se han recibido las siguientes propuestas:

**Por Galicia, Asturias, Santander y Vascongadas:**
D. JOSE LUIS BRINGAS TELLECHEA, de Bilbao
D. ADONIS GONZALEZ MEANA, de Gijón

**Por Andalucía, Canarias y Extremadura**
D. ANTOLIN COLMENAR RIVERO de Sevilla

**Por Alicante, Valencia y Murcia**
D. FELIX NAVARRO CLEMENTE, de Valencia

**Por Castilla, León y Aragón**
D. VICTOR ORTIZ GRATAL, de Zaragoza

Se ruega a todos los socios federados envíen su voto a fin de elegir los vocales correspondientes a cada zona. Fecha límite, el 31 de mayo de 1979.

**ĈEFDELEGITO DE U.E.A.**—De conformidad con la propuesta formulada por la directiva de la Federación Española de Esperanto, la Oficina Central de U.E.A. en escrito de fecha 12-12-1978 ha confirmado el nombramiento como Ĉefdelegito (Delegado Jefe) de U.E.A. para España a D. Juan Azcuénaga Vierna, residente en Santander, calle Capitán Palacios 3-4º N. El Sr. Azcuénaga sustituye en el cargo al Sr. Hernández Yzal, de S. Pablo de Ordal, (Barcelona) que por razones profesionales y después de varios años en el cargo había presentado su dimisión. Desde este Boletín, deseamos mucho éxito al nuevo Delegado y agradecemos la labor realizada por el Sr. Hernández Yzal.

**COTIZACIONES DE U.E.A.**—Se comunica que las cotizaciones para 1979 son las siguientes:
Miembro individual con Anuario: 720 ptas.
Miembro abonado con Anuario y Revista «Esperanto»: 1.800 ptas.
Abono a la Revista Esperanto solamente: 1.080 ptas.

En los dos primeros casos, si el abonado tiene menos de 25 años, recibe automáticamente la Revista Juvenil «KONTAKTO».

EL PAGO DE LAS COTIZACIONES DEBE HACERSE DIRECTAMENTE AL NUEVO CEFDELEGITO: D. Juan Azcuénaga Vierna.

# GRUPO «FIDO KAJ ESPERO» (Valladolid)

## ISRAELA ESPERANTISTA PARO VIZITAS VALLADOLID



De Maldekstre: S-ino Ma Aurora Viloria, ĵurnalistino kaj Direktorino de «BOLETIN», Mag. Isaj Dratwer, elstara israela esperantisto kaj S-ino Ma Rafaela Urueña, dum intervjuo farita al S-ro Dratwer.

La 15-an de Julio vizitis la urbon Valladolid, gesinjoroj Anna kaj Isaj Dratwer, ambaŭ aktivaj kaj senlacaj laborantoj favore al la disvastiĝo de nia internacia lingvo ESPERANTO.

Ambaŭ, ege konataj en la internaciaj esperantistaj medioj, multe kaj efike laboradis dum sia tuta vivo kaj nuntempe ili tiel daŭrigas kun granda entuziasmo.

Mag. I. Dratwer, multjara kunlaboranto de C.E.D., **kompilis** la opiniojn de famaj homoj laŭlonge de la jaroj pri la internacia lingvo en sia verko titolita **Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj**» kies lasta eldono aperis en Tel-Aviv dum 1977.

Okaze de ilia vizito al nia urbo, oni profitis la okazon por ke loka ĵurnalistino, nuna Direktorino de «BOLETIN», intervjuis ilin pri ilia lando kaj ilia esperantista agado. La interesa kaj ampleksa intervjuo aperis en la loka ĵurnalo DIARIO REGIONAL la 22 an de Julio.

**Esperantistino**

# ESPERANTISTA VIVO
# SUK-78

## SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ EN LIEĜO, BELGIO

Dum la monato aŭgusto, okazis, kiel tradicio, la Someraj Universitataj Kursoj, kia celo estas kontribui al aplikado de la Internacia Lingvo Esperanto en universitata instruado kaj la pliintensigo de la internaciaj sciencaj kaj universitataj rilatoj.

Ĉi-jara kurso estas la kvara Sesio, La programo estis vere interesa kaj ambicia, ĉar temis pri kvar temoj: Astronomio, Psikologio, Internacia Literaturo kaj Perfektiga Esperanto-Kurso.

Famaj esperantistoj instruis en la diversaj klasoj, oni mencias iujn: prof. H.H. Maitzen kaj C. Piron.

Ĝenerale la organizo estis perfekta, kaj oni nur povas bedaŭri, ke partoprenis malmultaj kursanoj, ĉu pro manko da informado, ĉu pro la dato, tre proksima al la I.J.K. de TEJO kaj la U.K. en Bulgario.

Espereble la organizantoj solvos tiun problemeton en la estonta SUK, kaj, la sukceso estos pli granda ol nun.

HENRIKO JIMENO

## ESPERANTO KAJ POPOLA KULTURO

Sub la supre menciita titolo okazis en la Biblioteko de la Historio pri Edukado de la Fakultato pri Filozofio kaj Sciencoj pri Edukado, el Barcelono, grava ekspozicio de la 3an ĝis la 12an de majo. La koncerna materialo cedis por la okazo la Muzeo de Esperanto situata en San Pablo de Ordal (Barcelona).

## STARIGO DE INTERPARLAMENTA GRUPO «AMIKOJ DE ESPERANTO»

La 18an de januaro 1978 je la 16,30 horo ĉe la salono de la Senata Komisiono pri Agrikulturo, okazis la fondiĝa kunveno de la Parlamenta Grupo «Amikoj de Esperanto». En Britujo ekzistas simila Grupo kiu konsistas el 56 membroj.

# MIKAELTAGO

*Trans herbejoj autun nun paŝas,*
*en la poŝ rustit ŝlosil'e*
*somerpordojn feste ŝlosis,*
*dormemis rano, ekdormetis erinaĉ.*

*(HELGI MULLER)*

Nun estas aŭtuno vera mastro. Mikaeltago, je la 29a septembro, estas antaŭ pordo. Adiaŭdante disigis de ni ravriĉa kaj varmabunda somero. Disiĝos ankau septembro kaj naturo preparas sin por akcepto de la vintro. Por tio preparas sin ankaŭ kamparano kaj celebras Mikaeltagon.

Se oni supozis ke Juri estis inicianto de printempaj kamplaboroj, tiam Mikaelo devis finigi ĝin. Tiu tago estis grava tago en la vivo de terkulturisto. Tiu estis festotago de finiĝo de la kamplaboroj, kaj la tagon oni supozis kiel la lastan de la somero, malantaŭrigardon de la kamparano, al faritaj laboroj kaj akiraĵoj dum somero. Mikaelo diris kion la kamparano dum somero estis farita. Junularo ĉirkaukuris en vilaĝo, kantis kaj ludis, same oni reciproke vizitis geamikojn kaj konatulojn. Samtempe estis Mikaeltago kiel unua vintro festo, samkiel la Maarjatago estis kiel unua printempa festo. Se oni ne celebris Mikaeltagon, tiam sekvontjare vulpo venis al brutaro, farante grandan malutilon, ankaŭ greno sur la kampo ne kreskis, kaj kanabo kaj lino naniĝis.

Kutime Mikaeltago estas dum la tempo kiam arbaroj kaj parkoj flagriĝas en pompaj (belegaj) farboj, en ĉiuj tonoj kaj nuancoj. Sed kiam unuaj noktofrostoj ĝin kisas, komencos folipluvado (faliĝo) ekde pratempo daŭriginta ĉiujara okazaĵo en flauro. Verdaj folioj flaviĝos kaj aliigos susura, kiel fluganta oro en la vento.

Kaj ofte estas tiel, vekigante dum Mikaeltago matene kaj rigardante tra la fenestro, estas konstruaĵ tegmentoj, bareloj kaj la tero kovrita per halo. Super kampoj kaj herbejoj svebas trapremita malvarmo. Por Mikael tago oni buĉis en bieno ŝafojn, faris bieron kaj bakis hordeopanon. Pratempeoni alportis duon da de la hordeopanon sur la subtegmento, en la buŝelo de Tonn, por dankesprimo al Tonn, al feo de kampoj kaj brutaro, kio permesis kreski grenon sur la kampo kaj lasis grasiĝi brutojn. Oni konis Tonn ĉefe en okcident-Estonio, pleje en distrikto Vandra, kie oni nomiĝis ĝin ankaŭ kiel, Vandra kandelo, ĉar en buŝelo devis esti ankaŭ vakskandelo.

Diversloke en nia hejmlando oni oferis al feo de kampoj kaj brutaro dum Mikaeltago kokon. Tiun faris mastro. Plumoj, kapo kaj piedoj de la koko oni bruligis sur la Ukuŝtono (Uku estis Dio de pratempaj Estonoj) de la viando oni pakis festenon, kaj unu parto de tio oni alportis sur la sama ŝtono, al feo kaj al animoj de pragepatroj. Sed poste ĝin mem formanĝis, dum solena verpermanĝo, de kio tuta domanaro partoprenis. Tiu estis solena verpermanĝo, per kio oni rimarkis finiĝon de la kamplaboroj.

Se oni ankoraŭ ne komprenis legi nek ekzistis kalendarojn, kulis tempon ekde Midaeltago ĝis Juritago, kaj de tie plŭ laŭ semajnoj. Gepatroj instruis ĝin al siaj infanoj kaj ili siavice al siaj infanoj. Do-De Mikaeltago 6 al martintago (6 semajnoj), de martin 2 al kadri tago. De kadri 4 al Kristnasko, de Kristnasko 6 al kandeltago, de kandeltago 7 al Maarjatago, de Maarjatago 4 al Juritago, de Juritago 9 al Johanntago, de Johanntago 7 al Lauritstago, de Lauritstago 7 al Mikaeltago, kaj estis tuta jaro, 52 semajnoj.

Venonte se la homoj jam komprenis legi kaj ekzistis kalendaro: tamen gepatroj instruis pratempan kalendaron al siaj infanoj, ĉar oni opiniis kiel honto se homo ne sciiş, ekzemple kiom da semajnoj estas el Juritago al Johanntago.

Dum Juritago dungitaj someranoj (servistoj) oni liberigis el bienlaboro dum Mikaeltago, kaj prudenta mastro aranĝis al ili amuzan vesperon. Oni drinkis glaseton da Mikaelbrando kaj al someranoj elpagis ilia salajron. Juri la sklavon fermligis, Mikaelo Liberigis, diris proverbo Sed jarservistoj restis la mastron plu sklavadi, sed ili festis kune kun disigantoj kaj kun tuta domanaro.

Kun Mikaeltago finis ankaŭ pastistinfan jaro, kaj brutaro restis en brutejo, kaj oni nutris ilin per pajlo. De sur la pastejo malaperi brutovoĉoj nek sonis plu brutartrumpeto. Nun plu ne povis brutojn ellasi kvankam post Mikaeltago kelkjare daŭris tute varmaj veteroj. Oni timis vulpojn de kiuj dum Mikaeltago forprenas bridoj kioj al ili dum Juritag enkapigis. Nun vulpoj ricevis liberecon, povante mordi brutojn. Ankaŭ ĉevalojn plu ne restis por nokto sur la paŝtejo, ĉar, «hundidoj de la Sankta Juri» ĉirkaŭ vagadis, povante nokte ĉevalojn mordi. Malgraŭ de la kredo, kelkloke oni tamen lasis brutaron post Mikaeltago sur la paŝtejo, por manĝ navkreskitan herbon.

Ekde Mikaeltago estis virino en cambro kaj rapoj en kaverno, finigis eksteraj laboroj al virinoj, ili restis nun al hejmaj agadoj, kaj viroj pleje al eksteraj laboroj. Komencis komunaj linopurigad laboroj, kiojn ordinare laŭ laborfesto estis faranta. Kvankam tio laboro estis tre polva, sed malgraŭ tio vesperoj estis tre amuzaj kun dancoj, kantoj, rondludoj kaj petoloj. Tiu estis al knaboj kaj knabinoj (geservistoj) loko por renkontiĝo dum tiaj pezaj kaj grizaj tempoj, kiam societa interrilat estis ege limigita kaj primitiva. Sed laboro progresis kaj linodraŝoj estis draŝita. Poste virinoj kaj knabinoj spinis, teksis kaj trikis. Al viroj komencis arbohakad tagoj en arbaro, branĉaĵo kolekto kaj hako de bezonlignoj.

Unu de plej grava okazaĵo dum Mikaeltago estis ankoraŭ Mikaelfoiro, kiam foirokomercistoj tranoktis en bieno, de kie ili frumatene rapidis al foiroplaco. Tiam estis ĉe ni ĉian nacion; judoj, tataroj, rusoj, kaj kolportistoj dun siaj pakaĵaĉoj, linokomercistoj, ĉevalnegocistoj, grasobrutarkomercistoj kaj aliaj. Grandan intereson kaj aldernon proponis la foiro en ĉiutaga vilaĝvivo. La foirotago estis kiel festotago, traviva riĉa per sia multkoloro, bildobutikoj, cirko kaj klaunoj, bombonoj, foirobukloj kaj kun dolcâj legumoj kaj buŝharmonikoj.

Dum Mikaeltago oni profetis ankaŭ venontan jaron. Se la arbaro dum Mikaeltago estis flava, devis somergreno dum sekvanta jaro justa tempe maturigi kaj doni bonan rikolton. Se arbofolioj dum Mikaeltago ankoraŭ estis verdaj, oni atendis molan vintron, sed kampoj devis printempe pro la halo toleri. Se arbofolioj dum Mikaeltago jam estas defalita, signifis tio al antaŭstaranta jaro fruan printempon, dum Maarjatago devis neĝo esti deĝelita, kaj herberoj verdiĝis. De kie la vento blovas dum Mikaeltago, de tie ĝi blovas dum la tuta vintro. Se dum Mikaeltago la tero jam blanka, estas Kristnaskoj nigraj. Se dum Mikaeltage dondras, venos varma kaj longa aŭtuno. Se la laktvojo dum Mikaelnokto estas hela kaj brila, venos neĝriĉa vintro. Bela vetero dum Mikaeltago alportos malvarman vintron, pluva aŭ neĝa-mola vintro kun siaj degelveteroj. Tiel oni profitis.

Dum Mikaeltago urso eniros sian neston, restante tien en vintrodormo, dumkandeltago (2 februaro) ĝi turnos alian flankon kaj dum Maarjatago (25 marto) ĝi eliros de sia nestro antaŭ sunleviĝo. Al kuloj kaj kuletoj? estas severe malpermesita ekde Mikaeltago brutojn turmenti kaj suci ilian sangon. «Kulo estas viro ĝis Mikaeltago, tabano fekaĵo ĝis Partlitago (24 aŭgusto)», diris pratempanoj.

Se hirundo estas ankorau dum Mikaeltago ce ni kaj alaudo lirliras, venos longa kaj varma aŭtuno, estas tiuj birdoj disiĝintaj, tiam baldaŭ veteroj malvarmiĝos kaj alvenos frua aŭtuno. Brasikokapo intencas dum Mikaelnokto ankoraŭ kreski, kaj ŝiras ĉirkau gi bandagintan lanofadenon. Sed terpomo estas forigita kaj tute ĉiuj kamplaboroj finitaj. Kampoj nun restas al vintroripozo!

Tiel estis pratempe.

**El Eston lingve, laŭ Kusta Poldmaa**
**tradukis Sally Lomp**
**1977 j.**

## KUNVENO DE H.E.F. ESTRARANOJ KUN REPREZENTANTOJ DE BARCELONAJ E. GRUPOJ

La 17an de julio okazis en la sidejo de Barcelona Esperanto Centro kunveno de reprezentantoj de la diversaj Esperanto-Grupoj ekzistantaj en la urbo kaj en ĝia provinco, kun H.E.F. Prezidantino S-ino María Rafaela Urueña kaj sia edzo kaj Sekretario de H.E.F. S-ro Luis Hernández.

Dum la kunveno, kiu okazis en tre amika etoso, oni parolis pri diversaj temoj rilate al la agado de la nova H.E.F. estraro kaj la Sekretario respondis la diversajn demandojn faritaj de la ĉeestantoj.

Jam en tiu kunveno la H.E.F. estraranoj informis pri la ebla okazigo de la nunjara Hispana Esperanto Kongreso en León.

Ci tiu kunveno diu okazis profitante halton en Barcelono de ambaŭ geedzoj, dum ilia vojaĝo al Varna, por tien partopreni en la 63 Universala Kongreso, estis vere interesa.




**Invititaj de S-ro Aragay (Prezidanto de Barcelona Esperanto Centro) kunvenis reprezentantoj de diversaj E-Grupoj el Barcelono kaj provinco kun la Prezidantino kaj la Sekretario de H.E.F.**




H.E.F. Prezidantino kaj Sekretario kun reprezentantoj de Barcelonaj E-Grupoj antaŭ «Llibreria Esperanto» post informa kunveno.

---

## INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ
## 35a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Austerlitz estas intima vilaĝeto en la komunumo Zeist. Ĝi situas sur la Utrecht-montetaro en unu el la plej belaj ŝtataj arbaroj en Nederlando.

Austerlitz estas facile atingebla per aŭtomobilo — la nacia ŝoseo A12 inter Utrecht kaj Arnhem pasas 2 kilometrojn for de la vilaĝo. Austerlitz estas facile atingebla per fervojo. La plej konvena stacidomo estas Utrecht; la plimulto el la internaciaj trajnoj, kiuj celas Nederlandon, trapasas tiun stacidomon. Flugliniaj busoj regule ligas la stacidomon en Utrecht kun la internacia flughaveno Schiphol. Foriras regule de la stacidomo Utrecht busoj, kiuj trapasas Austerlitz; la vojaĝo daŭras 20 minutojn.

Partoprenantoj de la 64a Universala Kongreso en Lucerno (Svislando) ne spertos malfacilaĵojn, ĉar internaciaj trajnoj donas rektan servon de Utrecht ĝis Lucerno laŭ la Rejnvalo. La vojaĝo daŭras ĉ. 10 horojn, kaj pro tio la kongreso finiĝos frue en vendredo la 27an de julio, por lasi tempon vojaĝi. La apuda ŝoseo A12 provizas la plej rektan vojon inter Nederlando kaj Svislando. Rektaj flugoj de Schiphol ĝis Zuriko estas multaj.

## (Saluttelegramo)

Al lia Sankteco
Johano Paŭlo 2ª
Vatikano

Partoprenante la komunan ĝojon pro la elekto de Via Eminenco kiel Anstataŭanto de Kristo en la Katedro de Petro, mi esprimas, en la nomo de katolikaj esperantistoj el 60 landoj, la plej korajn gratulojn kaj la ardajn dezirojn de Dia beno al Via plua laboro sur nova vojo de la Eklezio.

Ne eblas ne substreki la fakton, por ni historian, ke la lasta, 37ª Kongreso de Internacia Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj okazis ĝuste sub la Alta Protektado de Via Sankteco, tiam Kardinalo kaj Metropolito de Krakovo. La vortoj de Via Sankteco, tiam adresitaj al la Kongreso:

«Unu kredo kaj unu amo helpu al vi unuiĝi la disbatitan mondon en unu ŝafaron sub unu Paŝtisto. Unu supernacia lingvo —Esperanto— ankaŭ servu efike al ci tiu nobla celo»

restos por ni kiel devizo en nia daŭra laboro.

Kun fila sindono

**P. Czesław Biedulski, kap.**
**Prezidanto de IKUE**

# ESPERO KATOLIKA JUBILEAS

La oficiala organo de la Katolikaj esperantistoj celebras ĉi jare la 75 jara fondiĝo.

En 1903, tio estas, du jaroj antaŭ la okazigo de la unua Universala Kongreso en Boulogne Sur Mer (Francujo) aperis la unuan numeron de Espero Katolika.

Ekde la unua momento, ĉi tiu revuo estis vere ekumena kaj neŭtrala, kaj montris ĉi tiujn karakterojn malfermante ĝiajn paĝojn al ĉiuj nuntempaj problemoj.

Ekde la paĝoj de BOLETIN ni volas gratuli sian Direktoron D-ro Antonio De Salvo kaj siajn kunlaborantojn en la redakciaj taskoj, inter kiuj troviĝas hispanaj esperantistoj.

Do, ni rekomendas ĉi tiun revuon al la katolikaj esperantistoj kaj al ĉiuj kiuj interesiĝas pri katolikaj kaj ekumenaj temoj. Mendu senpagan specimenon al D-ro Antonio De Salvo.

Via Berni 9
I-00185 ROMA (Italio)

## Mesaĝo de s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko)

### al la 63-a Universala Kongreso de Esperanto
(Varna, 29-a julio — 5-a augusto 1978)

Ne povante alparoli vian Kongreson, kiel mi faris la pasintan jaron en Rejkjaviko, mi deziras direkti al vi, en mia propra nomo kaj ankaŭ en la nomo de la Organizo, kiun mi estras, mian plej koran saluton.

Unesko ekkonos la konkludojn de viaj debatoj kun des pli da interesiĝo, ke la kongrestemo, dediĉita precipe al la internacia edukado, tuŝas plurajn demandojn, kiuj estas ankaŭ inter ĝiaj propraj zorgoj: edukado al la plenaĝuloj, plibonigo de la instruprogramoj por la Tria Mondo, Rekomendo de la Ĝenerala Konferenco de Unesko pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

Tiel vi pretiĝas por apliki en la eduka kampo tiun sercadon de unu **komuna lingvo** —en propra kaj figur sencoj—, kiu estas la ekzistokialo mem de Universala Esperanto-Asocio. Kun plej laŭdinda persistemo vi faris vin la pioniroj de internacia kunlaboro, kiu malfermas novajn vojojn al dialogo inter la popoloj kaj inter la kulturoj. Miaj plej varmkoraj kuraĝigoj akompanas vin ĉe tiu ĉi nobla tasko kaj mi formulas la deziron, ke vian laboradon kronu la plena sukceso, kiun ĝi meritas.

---

RADIO ROMA elsendas en Esperanto ĉiu dimanĉo, de 20,00 ĝis 20,20 laŭ grenviĉa tempo (21,00-21,20 laŭ mezeŭropa tempo) sur jenaj ondlongoj frekvencoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| metroj: | 31,33 | 41,15 | 41,24 |
| KHz | 9575 | 7290 | 7275 |

Raportoj pri aŭdebleco estas bonvenaj. Oni bonvolu indiki daton kaj horon.

---

RADIO VATICANA elsendas esperantlingve ĉiuj dimanĉoj de 21,05 ĝis 21,15 diversajn informojn pri la Katolika mondo kaj religiajn pensojn. Se vi aŭskultas tiun elsendon, nepre skribu bildkarton al la Redakcio.

# NOVAĴOJ EKZISTANTAJ EN LIBRO-SERVO DE HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

| | |
|---|---|
| La morto de la ĉielarko (E. Ady) | 325 ptoj |
| Kain Kaj Abel (S. Szathmari) | 510 ptoj |
| Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo (Lapenna) | 360 ptoj |
| Vivo de Lanti (E. Borsboom) | 884 ptoj |
| Balaton (poŝformata libro kun multaj fotoj) | 105 ptoj |
| Budapest (poŝformata libro kun multaj fotoj) | 105 ptoj |
| La Knaboj de Paŭlo-Strato (Ferenc Molnár) | 483 ptoj |
| El La Verda Biblio (I. Lejzerowicz) | 285 ptoj |
| La Aventuroj de L.R.M. Stultulof la X-A (F. V. Dorno) | 380 ptoj |

LIBRO-SERVO DE H.E.F. ATENDAS VIAJN MENDOJN PRI LIBROJ

# DONACOJ POR «BOLETIN»

En venonta numero ni publikigos la nomojn de ĉiuj kiŭj malavare donacis por BOLETIN kaj al kiuj ni esprimas niajn plejn korajn kaj sincerajn dankojn.

# REVUOJ RICEVITAJ

En la sidejo de Hispana Esperanto Federacio (Dos de Mayo, 4) ni ricevis la jenajn esperantistajn publikaĵojn

L' ESPERANTO (revuo de itala esperanto federacio)
REVISTA PORTUGUESA DE ESPERANTO (Oficiala organo de P.E.A.)
INFORMILO de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien
LA ESPERO (oficiala organo de Sveda Esperanto Federacio)
L'AZIA LANTERNO (oficiala organo de Korea Esperanto Asocio)
KOLEKTADO de Moyá (Barcelona)
STARTO (oficiala organo de Ĉeĥa Esperanto Asocio)
UN kaj NI (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de U.E.A.)
NORVEGA ESPERANTISTO (Oficiala organo de Norvega Esperantista Ligo)
H.E.J.S.
INTERNACIA FERVOJISTO (Oficiala organo de I.F.E.F.)
LA REVUO ORIENTA (Oficiala organo de J.E.I.)

Al ĉiuj ni kore dankas pro ĝia afableco.

# NI, ESPERANTISTOJ

## La mesaĝo de «La Espero»

Ordinare, respondeca homo ne fundamentas sian agadon nur por la nuna momento, li zorgas ankaŭ pri la estonteco. Li konjektas, ke la irado de la estonteco ne estas nura afero de la sorto aŭ hazardo, sed precipe de la agado por prepari ĝin. Konscia homo agas tiamaniere, ke la sorto aŭ la hazardo nur minimume reflektiĝu en lia vivo.

En nia moderna vivo oni estas asekurita eĉ kontraŭ multaj riskoj de la malbona sorto; la hazardoj de akcidentoj, malsanoj kaj ceteraj riskoj, kiuj ne estas antaŭvideblaj nek haltigeblaj. Oni simple reduktas tiujn riskojn de la estonteco al minimumo.

Ju pli konscia estas homo des pli planas sian estontecon. Oni, laŭ eblo, elektas la metion aŭ la studadon por perlabori; oni elektas la personon por estigi la geparon; oni eĉ planas la nombron da filoj por ke tiuj ne estu tiel nombraj, ke oni ne povu ilin subteni kaj adekvate eduki. En konscia homo, la menso pli regas lin ol la instinto, pli la zorgo por la estonteco ol la nura hazardo de la sorto; kaj kolektive, oni eĉ povas aserti, ke irado de la disvolviĝo de la civilizacio havas tiun direkton.

Sed tio, kio estas atingita en la agado de la personoj, kaj eĉ en la kadro familia, ĉu estas atingita ankaŭ en la kadro de la kolektivo? Socie, oni povas diri, ke en la kadro urba kaj nacia, ofte oni trovas la saman klopodadon por la estonteco. Oni konstruas vojon, basenojn, lernejojn kaj universitatojn, ne nur por la hodiaŭaj bezonoj, sed precipe por la estontaj. La civilizita vivo estas orda socio, ne ĥaosa, sed tia vivado, ankoraŭ ĝis nun, ne atingis realiĝi en la kadro tutmonda. La internacia vivo ankoraŭ nun estas tute ĥaosa. Se iu ajn pensanta estaĵo komtemplus, el ekster la Tero, la homaron entute, li vidus ĝin kiel ni vivas kunbatalantajn sovaĝajn tribojn.

Fakte, la homoj, kiel homaro, nun malgraŭvole, estas solidaraj en la mondo. Se en iu lando oni detruas la ekologian ekvilibron, la natura malekvilibro transiras la najbarajn landojn. Se la krudaj materioj kaj la fontoj de energio elĉerpiĝas, la problemoj de la homaro entute akriĝos. Se tio alportus la reciprokan alfrontiĝon de la potencoj, kaj tiuj volus perforte solvi aferon, nuklea milito inter la grandaj potencoj tiel venenus la atmosferon, ke eĉ la vivo malaperus de la tersurfaco. Tiel la konsciaj homoj, kiel la nekonsciaj, tiel volonte kiel kontraŭvolonte, la homoj entute estas solidaraj, kaj tion oni devas konscii.

Se la personoj estas konsciaj pri si mem, se eĉ en la plano urba kaj nacia la homoj proponas sin agi konscie, en la plano tutmonda la homaro ne havas konscion, kaj tutmonde regas la plej sovaĝa sovaĝeco.

Ĉu ni, esperantistoj, ne estas la unuaj, kiuj agadas laŭ tutmonda skalo? Kion signifas starigi internacian lingvon por la tuta homaro? Kion signifas la mesaĝo de «La Espero»?

Per la lingvo Esperanto, ni, esperantistoj, devas esti la forĝistoj de la homara konscio, kiu forigante la ankoraŭ tutmondan sovaĝecon, faru ke la homaro povu atingi en paco pli altan ŝtupon de civilizacio.

**G. Moya**

# ANONCOJ, ANONCOJ, ANONCOJ

HUNGARA VIVO, Jarabono (6 numeroj): 300 p-toj.
JUNA AMIKO, Jarabono (3 numeroj): 100 p-toj.
BUDAPESTA INFORMILO, Jarabono (12 numeroj): 200 p-toj.
LA KANCERKLINIKO. Abono po 4 numeroj: 400 p-toj.
PERANTO POR HISPANIO: ADONIS GONZALEZ MEANA
Ramón y Cajal, 44-3º iz.
GIJON (Asturias)

Tiuj kiuj serioze okupiĝas pri folkloraj kantoj skribu al:
S-ro Goar Engeländer, Thomasweg 3, D-4796 Salzkotten (Germanio)

Algluebiaj afiŝetoj kun teksto. «Esperanto idioma universal» aĉeteblaj po 5 p-toj, minimuma mendo 10. GRUPO FIDO KAJ ESPERO, Dos de Mayo 4. VALLADOLID.

# DEZIRAS KORESPONDI


S-ino kaj S-ro Helmut Bein
409 Halle-Neustadt. Block 147/2, G.D.R. DDR
(Ili estas geedzoj, 33-54 jaraĝaj, instruisto kaj oficistino. Interesas pri muziko, turismo, p.m.

S-ro Georgi Lebanov
4644 V. Kostandovo. Distr. Pazargik.—BULGARIO
Li interesiĝas pri hispana folkloro, kutimoj, popolaj kostumoj, k.t.p.

Serĉas korespondantojn, junaj, maljunaj, viraj, virinaj, studentoj, oficistoj, komercistoj... koreaj Esperantistoj kun ciuj interesiĝoj.
Sendu leteron aŭ bildkarton al:
KAMPANJO 78: Korespondo KOREA ESPERANTO ASOCIO
CPO Kesto 4258 **Seulo** Korea Respubliko

Ĉiuj kiuj deziros publikigi sian anoncon pri korespondado, bonvolu sendu ĝin al la Ĉefredaktoro de BOLETIN, S-ro Aragay.
Skribu tajpe au preslitere por faciligi la korektan publikigon.

Acêtu kaj donacu unuopajn ekzemplerojn de BOLETIN, eldonitaj en Valladolid.
Prezo: 50 p-toj
Mendu tuj al H.E.F. Dos de Mayo, 4 - VALLADOLID.



*64-a U.K. de ESPERANTO, okazonta en LUCERNO (SVISLANDO) de la 28-a julio ĝis 4-a aŭgusto 1979.*
*H.E.F. organizas ekskurson al la U.K. en* ***Lucerno*** *kunlabore kun VIAJES ECUADOR, kiu sendos al vi detalajn informojn.*
*Aliĝiloj kaj kongresmaterialo, petu al H.E.F.*